Mi rigardis en la aktuala LISTO DE MEMBROJ kaj trovis 32 eks-anojn de EANA kaj 21, pri kiuj mi ne estas certa. Eble ni eks-anoj de EANA povus cirkuli Peticion petantan, ke oni nomu ELNAn "deveno" (lineal descendant) de EANA, tiel rajtigante, ke ni povu al la publiko diri, ke nia Ligo datas de 1905, la dato de la fondiĝo de EANA. (Vere—eksmembroj de EANA fondis ELNAn, ĉu ne?)

Mi ĝojas pri la nuna aspekto de nia NEWSLETTER! Mi povas senhezite montri ĝin al neesperantistoj.

La sekcio, RAPORTO DE ELNA 1988-89, estas laŭdinda.

Ni devus eviti uzi la terminojn Ameriko, amerika(no). Kaj estas almenaŭ la jenaj "Unuiĝintaj Ŝtatoj de—": Meksiko, Brazilo, Venezuelo, Kolombio.

Conrad Fisher

[*La historio pri la rompo inter EANA kaj ELNA estas interesa, sed eble ankoraŭ neelfosenda. Pri la Raporto de ELNA 1988-89: tiu estis la laboro de multaj homoj, inter ili Ellen Eddy, Mark Stephens, Bill Harmon, Greg Wasson, kaj la redaktoro. Se ne menciŭ la diversajn komisiitojn, kiuj faris la dumjaran laboron kaj verkis la raportojn...*]

[**William F. Orr havas intereson pri la kuba afero.**]

Min interesege legi pri la atesto antaŭ la Parlamenta Komitato. Mi intencas ankaŭ skribi al miaj Senatanoj kaj Representanto pri la afero. La ideo venis en mian kapon, ke eble la Kanada Esperanto-Asocio agas kiel peranto por usonanoj, kiuj volas aliĝi al la UK; sed tiun ideon mi ne povas eĉ flustri, pro

timo, ke la pensopolico traserĉos mian domon por kontraŭpatriaĵo havantaj cigaroj.

William F. Orr

[*...kiujn ili sendube konfiskos por la propra uzado. Fakte, laŭ mia kompreno de la leĝo, ni eĉ ne rajtas aliĝi al la Kongreso—eĉ por montri solidarecon—ĉar parto de la kotizo iros al la Kuba Esperanto-Asocio, kaj, laŭ la logiko de Niaj Estroj, al la Kuba Firegistararo, Nia Malamiko (kontraŭ kiu ni ĝis nun neniam militis).*]

[**El tiu iom diskutinda lando venas la jena grava anonco.**]

Niaj E-elsendoj fariĝis unujaraj la pasintan 1-an de septembro kaj la estrino de la radio parolis pri ebla ĉiutagigo de la programoj, kio dependas de la esperantista reago tutmonde. Do, ni bezonas leterinundon! Bonvolu aperigi nian alvokon.

Maritza Gutierrez Gonzalez

Redaktoro de Radio Havano Kubo

[*Aktualaj horoj/frekvencoj por nia lando troviĝas en la Anoncoj. Leterojn sendu al: Radio Havano Kubo, Esperanto-Redakcio, Poŝtfako 7026, HAVANO, Kubo.*]

[**Estas la kutimo de la redaktoro informi korespondpetintojn pri aperigo de iliaj anoncoj en la NL. Foje ili respondas, ĉu per korektoj pri la aperonta anonco, ĉu per aliaj komentoj. Jen tia responda letero, per kiu la verkinto dividas kun ni sian sintenon al Esperanto.**]

Mi kore dankas pro via letero de la 2-a de oktobro. Sed ĝuste mi estas duoble dankema al vi, ĉar vi ne nur aranĝis mian aferon kiel oni povis plej bone, sed ankaŭ vi konfirmis ankoraŭfoje tion, kio allogis min al la ideo de Esperanto, kaj nome la boneco de esperantistoj.

Mi fariĝis esperantisto post la Univerŝala Kongreso en Varsovio en la 1987j. Ĝuste tiam mi parolis /angle/ kun multaj partoprenantoj de la U K, kiuj alvenis Bjalistokon kaj ilia komuna trajto de karaktero estis boneco, kio treege imponis min. Kaj kiam ankoraŭ mi perceptis praktikan utilecon de tiu ĉi lingvo, mi tuj

komencis lerni ĝin. Nun mi esperantigas la romanon de Czeslaw Milosz, konkretinto de la Nobela Premio en la 1980-a jaro, "La valo de Issa", kio estos mia kontribuajo al Esperanto-movado.

Lastatempe mi sciigis pri la tertremo en la distrikto de San Francisko. Ĉi tiu fenomeno ne estas konata al mi, sed malgraŭ ĉio, kiel tondro frapis min ĉi tiu malĝoja sciigo. Mi ligas min kiu ĉiu loĝantaro de la katastrofe frapita distrikto en sincera bedaŭro.

Zbigniew MALYSZKO

Zajecza 17

15-531 BIALYSTOK

Pollando

[*Ne forgesu, ke s-ano Malyszko, kiu iasence prezentas sin per tiu letero, serĉas korespondamikojn.*]

[**Longtempa ELNAano Carlos I. de Jesus volas dividi kun ni sian opinion pri lastatempa Akademia decido.**]

Kiel multjara esperantisto, mi ne povas ne plendi kontraŭ unu el la fuŝoj en la "Normala Listo de Landnomoj", kiun la Akademio de Esperanto anoncis.

Temas pri la nova formo "Egipto" (por la lando ĉe la Nilo), anstataŭ la vorto "Egiptujo", mil fojojn uzata en la Biblio.

Kio okazas nun en Esperantujo, s-ro Redaktoro? Ĉu la geakademianoj opinias sin pli Esperanto-kapablaj ol Zamenhof? Ĉu ili arogas al si pri korekti sian Majstron?

Kia domaĝo! Mi vere malĝojas.

Carlos I. de Jesus

[*Mi ne redaktorece forigas la prefikson GE- en la vorto "geakademianoj", ĉar fine de 1988 estis fakte du virinoj (Boulton, Urbanova) en la 41-persona Akademio. Eble ili boligas la kafon por la veraj [viraj?] Akademianoj. Mi dankas al s-ano de Jesus pro lia [relative] afabla traktado de la afero "egipto"; por malpli afabla esprimo de simila opinio, vidu la artikolon "Ni ne omaĝu al apostato!" de (Akademiano) Bernard Golden en la oktobra numero de Monato.*]



Continued on next page

[El fora nordorienta Siberio (tamen pli fora de Moskvo ol de ni!) venas la jena propono pri kunlaborado.]

Mi havas nomon Aleksandr, aĝon—33 jaroj. Mia hobbio estas fotografado kaj Esperanto. La loko, kie mi loĝas, situas malproksime de centraj regionoj de Sovetunio. Tie ĉi estas tre interesa, originala kaj rigora naturo. Vintre estas multe da neĝo kaj forta frosto. Frosto atingas ĝis 50-60 gradojn sub nulo (Celsio) [proks. 60-80 sub nulo F.—red.]. Sed somere, kaj precipe aŭtune, nia naturo estas tre bela. Eĉ en nia lando oni malbone scias pri vivo en nia regiono, kaj mi ne povas imagi, kion oni scias pri nia vivo en Usono!

Mi volus, ke vidu nian lokon la homoj en la tuta mondo. Precipe nun, kiam en multaj landoj iu interesiĝas pri vivo en Sovetunio. Mi kunlaboras kun sovetia gazetaro, ankaŭ miaj fotoj publikigis en la Esperantaj revuoj.

Ĉu vi povas ekkontakti kun iaj revuoj,

skribantaj pri vivo en Sovetunio? Mi volas kunlabori kun gazetaro en Usono. Kaj vi estos miaj perantoj. Mi esperas, ke vi helpos al mi, atendas vian respondon.

Aleksandr Kovaljov
per. Majskij 2-6
SU-686410 OMSUKĈAN
Magadanskaja obl.
USSR

[Sajnas, ke tio estus bona uzo por nia lingvo rilate al, ekzemple, la sekcio Travel de la loka dimanĉa gazeto. La altan kvaliton de la fotoj de s-ano Kovaljov oni povas konstati per tiuj, kiuj videblas sur la malantaŭa kovrilo de El Popola Ĉinio, n-ro 1989(3). Ĉu iu(j) leganto(j) havas intereson kontaktiĝi kun s-ano Kovaljov pri la afero?]

[Charles Hall reports on his recent "family history" research trip to Eastern Europe.]

Possibly the most exciting thing about this trip was the opportunity I had to

lecture on Family History Research. ... The first lecture in Budapest was held at 11 A.M., Tuesday, Sep. 26, at the University in the English language. This one was advertised in a local newspaper, and drew a fairly large crowd. However, the language barrier did present a problem, because it was difficult for me to gear my English to what the audience could understand. The second lecture was presented the following evening in one of the Budapest Esperanto clubs. This time I gave my presentation in Esperanto, with one of the club members translating for the non-Esperantists and beginners. The lecture was advertised worldwide, and although there was not worldwide participation, we did receive letters from Poland and DDR (East Germany) wishing us well.

Charles Hall

Calendar

The calendar is a list of a few Esperanto-oriented events, regional, national and international, that we think would be of interest to some or all of our readers. For your information, we include the primary language(s) of each event.

6-8 April 1990: California Esperanto Conference, Esperanto. Subject: "Esperanto kaj Mono." For information: Esperanto Club of San Diego, P.O. Box 288012, San Diego, CA 92128.

11-20 April 1990: Practical Development of Esperanto Teachers, Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo, Gressillon, F-49150 BAUGE, Francio, tel. 41 89 10 34, 40 76 77 95.

11-20 April 1990: International Children's Meeting, Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo, Gressillon, F-49150 BAUGE, Francio, tel. 41 89 10 34, 40 76 77 95.

24-28 April 1990: The World In Formation. Languages not indicated (French, English, Spanish, German, Portuguese, Esperanto?), but heavy advertising in Esperanto. Topics: Peace, Development, Ecology, Worldwide Democracy. For information: Komitato de Organizado de la Unuaj Kunsidoj de la Tutmondismo, Poŝtfako 0631, 37006 TOURS CEDEX, Francio.

2-9 May 1990: 3rd International All-Soviet Festival of Esperanto Art in Voljskij, USSR, Esperanto. See announcements in 1989(7) for basic details. For information: Esperanto-EOLA, ab. ja. 73, u. VOLJSKIJ-30, Volgogradskaja obl., USSR-404130.

3-25 May 1990: Basic Acupuncture Course, Esperanto. For information: S-ino Wang Yuchun, Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, 100864 BEIJING, Ĉinio.

11-13 May 1990: BEL Printempa Senkrokodiliga Semajnfino (Springtime Decroixification Weekend) at Headlands Institute, Rodeo Lagoon, Marin County, CA. Esperanto. For information: Berkeley Esperanto League, P.O. Box 324, BERKELEY CA 94701-0324.

25-30 May 1990: 3rd International Academic Conference On Science and Technology in Esperanto in Beijing, China. Esperanto. Includes half-day and all-day excursions in Beijing and its environs; five optional post-Conference excursions in East China are also available. For information: S-ino Wang Yuchun, Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, 100864 BEIJING, Ĉinio.

1-20 June 1990: Advanced Acupuncture Course, Esperanto. For information: S-ino Wang Yuchun, Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, 100864 BEIJING, Ĉinio.

15 June-2 July 1990: International Friends' Meeting, Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo, Gressillon, F-49150 BAUGE, Francio, tel. 41 89 10 34, 40 76 77 95.

18 June-6 July 1990: Esperanto Summer Courses at San Francisco State University, Esperanto, some English. For information: Catherine Schulze, 410 Darrell Rd., HILLSBOROUGH, CA 94010, tel. (415) 342-1796.

25-30 June 1990: 3rd Annual Midwest Classes and Conference, Milwaukee, WI. Esperanto, English. For information: Esperanto Society of Michigan, P.O. Box 3011, SOUTHFIELD, MI 48037-3011.

1-14 July 1990: Pre-IJK/UK Esperanto Tourist Excursion in Quebec, Canada. Esperanto. For information: Esperanto-Societo Kebekia, C.P. 126, succ. Beaubien, MONTREAL Quebec H2G 3C8, Canada, tel. 1 (514) 495-8442.

2-16 July 1990: Lectures and Courses, Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo, Gressillon, F-49150 BAUGE, Francio, tel. 41 89 10 34, 40 76 77 95.

7-14 July 1990: Annual Conference of the Esperanto League for North America, Mexico City, DF, Mexico. Esperanto. For information, contact ELNA. Current plans are to combine this with a tourist pre-Congress for the World Esperanto Congress in Havana.

14-21 July 1990: 75th World Esperanto Congress, Havana, Cuba. Esperanto. For information contact UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, The Netherlands, tel. 31 10 436 10 44.

14-21 July 1990: "Mexico: The Colonial Route." Excursion of the Esperanto-Vojaĝservo, Esperanto. For information: Esperanto-Vojaĝservo, 578 Grand Avenue, OAKLAND CA 94610, Usono, tel. 1 (415) 836-1710.

17-31 July 1990: Learn and Practice (I), Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo, Gressillon, F-49150 BAUGE, Francio, tel. 41 89 10 34, 40 76 77 95.

21-28 July 1990: 46th International Youth Congress of the World Esperantist Youth Organization, Playa Giron, Cuba. Esperanto. For information contact TEJO at the address of UEA.

21-28 July 1990: Official UEA Post-Congress in Taxco, Puebla, Oaxaca, Mexico. Esperanto. For information: UEA or Esperanto-Vojaĝservo.

23-29 July 1990: Kvinpinta Semajno, southern Finland. Esperanto. For information: Riitta Pulli, Kulkustie 3 B 14, SF-36240 KANGASALA, Finland.

1-15 August 1990: Learn and Practice (II), Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo, Gressillon, F-49150 BAUGE, Francio, tel. 41 89 10 34, 40 76 77 95.

3-9 August 1990: International Youth Week, Szodliget, Hungary. Concerts, movies and videotapes, traditional ball, discussion groups, etc. Esperanto. For information: Lingvo-Studio, p/s Szilvasi Laszlo, 1675 BUDAPEST, pk. 87, Hungario.

10-25 August 1990: The Oomoto School of Japanese Traditional Arts: Cultural Seminar for Esperantists. Includes learning the tea ceremony, calligraphy, ceramic art and meditation techniques. Maximum 8 students. Esperanto. For information: Oomoto, Kameoka-si, Kyoto-hu, 621 Japanio, tel. 07712-2-5561.

16-31 August 1990: Summer School, Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo, Gressillon, F-49150 BAUGE, Francio, tel. 41 89 10 34, 40 76 77 95.

Anoncoj

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondeci definitivan plenumon de io ajn promesita en anonco.]

La unuan semajnon de marto 1990, bonvolu sendi protest-leteron kontraŭ ĉiujara bovtorturado (NE taŭreado) nomata FARRA DO BOI, al Governador de Santa Katarina, Palacio do Governo, 88.000 FLORIANOPOLIS, SC-Brazilo. (laŭ peto de s-ro George Otto Vaske de Kai, Brazilo)

En Krasnojarsk, Sovetio, eldoniĝas informilo "Adrjesa Druzej/Amikaj Adreŝoj", kiu portas la nomojn kaj adresojn de serĉantoj de korespondamiko kaj en kaj ekster Sovetio. Se vi volas proponi vian nomon por la informilo, bonvolu kontakti la eldonanton: Andreo Grigorjev, SU-660075 KRASNOJARSK, ab/ja 2420, Sovetio.

EarthSeals havas proksimume 5-centimetran sigelon kun la konata Apollo-17-fotajo de la tero kaj esperantlingva klarigo sur la bazo. La koloraj sigeloj kosta \$1 por ses, \$25 por 200, \$100 por mil; aldonu \$2 por afranko kaj, se vi loĝas en Kalifornio, la ĝustan imposton. Por aerpoŝtaj sendaĵoj eksterlanden, aldonu 2 cendojn por ĉiu peco. Adreso: EarthSeals, PO Box 8000, Berkeley, CA 94707 USONO. Indiku Apollo 17 (Eo).

La Instituto Internacia Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista en Svislando aranĝas plenan jarprogramon por 1990. La programo enkludas staĝojn, konferencojn, skiferiojn, kursojn diversnivelajn. Por dekpaĝa programo, skribu al la Instituto ĉe: Pf. 779, Strato Postiers 27, CH-2301 LA CHAUX-DE-FONDS, Svislando.

La rokmuzika organizo EUROKKA nun produktas Esperanto-Rok-Disketon kiu aperos komence de la jaro 1990. Por informoj kaj antaŭmendilo, petu al: EUROKKA, Esperanto-Rok-Asocio, F-31450 DONNEVILLE, Francio, tel. 61.81.91.65.

Jen horoj (UTC)/frekvencoj (kHz) de la ĉiudimanĉaj Esperanto-dissendoj de Radio Havano Kubo. Por okcidenta Norda Ameriko: 0800-0820/11835; por Norda Ameriko ĝenerale: 1700-1730/

15340,15285,15155,11820,11760,11725; 2230-2300/11970,11950,11910,5985. Por la plej ĝisdata horaro, skribu al: Radio Havano Kubo, Esperanto-Redakcio, Poŝtfako 7026, HAVANO, Kubo.

La redaktoro kaj lia edzino lastatempe ricevis kelkajn numerojn de Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj. Se vi kutime uzadas Esperanton en via hejma medio, se vi havas denaske Esperantlingvaj (ge)filo(j)n, aŭ se vi interesiĝas pri tio, vi verŝajne povos aldoni vian nomon al la listo de partoprenantoj en la Cirkulo, sendante viajn nomon (kun tiu de la geedzo), adreson (kun telefonnumero) kaj nomojn kaj naskiĝjarojn de idoj al: Renato Corsetti/Anna Lowenstein, Colle Rasto, I-00039 ZAGAROLO, Italio, tel. (06) 95 25 713.

Kastora Klubo estas internacia Esperanto-Klubo de Amikeco al kiu apartenas infanoj, gejunuloj kaj plenkreskuloj el 60 landoj. Ĝi helpas trovi korespondamikojn en aliaj landoj. Sufiĉas sendi al la klubo informojn pri familia kaj persona nomoj, naskiĝdato, sekso kaj intereso. Al Esperanto-instruantoj kunlaborantaj kun la Klubo ĝi sendas senpage la kluban bultenon, kiu krom la informojn pri klubo vivo enhavas ankaŭ facilajn legaĵojn, versaĵetojn, kanzonetojn. Multaj Esperanto-instruistoj uzas ilin kiel instruhelpilojn. Por pli detalaj informoj: Kastora Klubo, Pulawska 3-11, 02-515 VARSOVIO, Pollando.

La Venezuela Esperanto-Unuiĝo volas havigi al si ekzemplerojn de la Sankta Biblio, kun Malnova Testamento en traduko de L.L. Zamenhof. Se iu povas helpi al ili tiurilate, bonvolu komuniki senpere kun la Prezidanto de la grupo: David G. Valecillos V., Calle 79, N-ro 3C-72, MARACAIBO 4002, Venezuelo.

La Volĵskija Esperanto-Klubo "Samideanoj", Esperanto-Sekcio de Turisma Firmao "ORBITA" kore invitas vin partopreni la III-an Internaci-Tutsovetian Festivalon de Esperanto-Arto "EOLA-90" kiu okazos en VOLĴSKIJO (je 16 km. de urbo Volgogrado) la 2an ĝis 9a de majo, 1990. Nombro de partoprenantoj ne estas limigita. La Festivalo estos la plej granda Esperanto-evento por Sovetio post la jaro 1926 kaj ĝin partoprenos reprezentantoj de sovetia telev-

ido, centra kaj loka gazetaraj, volgogradaj televido kaj radio. Jam konfirmis partoprenon teatro-grupoj, kabaredoj, rok-grupoj ktp. el Germanio, Svedio, Ĉeĥoslovakio, Pollando Britio kaj Bharato, krom sovetiaj artistoj. Kostoj estas malaltaj. Por kondiĉoj, aliĝilo ktp. skribu al: Esperanto-EOLA, ab. ja. 73, u. VOLĴSKIJ-30, Volgogradskaja obl., USSR-404130.

Okpaĝa programo de Kastelo Gresillon por la somero de 1990 estas nun havebla. Por intereso: Gresillon situas en la bela valo de la franca rivero Loire, nelonge de la mezepoka urbo Angers kaj la belaj renesancaj kasteloj kiel Chambord kaj Chenonceaux. La Fonduso Belbona Espero donas subvenciojn al kelkaj gejunuloj kiuj deziras ĉeesti studperiodon en Gresillon. Se vi volas ricevi ekzempleron de la programo, aŭ demandi pri la subvencioj, skribu al: Kultura Esperanto-Domo, Gresillon, F-49150 BAUGE, Francio.

Lastatempe pluraj homoj demandis pri la havebleco de Esperantlingvaj literaroj (angle "fonts") por la komputilo Macintosh. Ekzistas pluraj tiaj literaroj. Se vi sendos Macintosh-diskon (vakan) kaj unu dolaron por poŝtkosto al la redaktoro de la Novaĵletero, mi resendos al vi tiujn, kiujn mi disponas. Pli bone, se vi uzas la informreton Compuserve, vi povas ĉerpi ilin el ĝi; ili troviĝas en la Fremdlingva Forumo (GO FLEFO), en dosieraro n-ro 8 (Esperanto) kun titolo ESPFNT.MAC.

Por tiuj, kiuj abonis la revuon *Fokuso* en 1989 sed ankoraŭ ne ricevis eĉ unu numeron: ni ricevis klarigan leteron de MIKOLA Klara, la vic-redaktoro. Laŭ tiu letero, ekzistas pluraj kialoj de la prokrasto; kaj por iel regajni tempon, oni decidis fari unujaran paŭzon laŭ la kalkulado. Do post la numero 88/4 venos 90/1, kiu aperos ĉi-jare (1989). Kompreneble la abonoj por 1989 validas por la venonta jarkolekto, kaj vi ricevos ĉiujn numerojn, por kiuj vi pagis.

A copy of legal memo prepared for ELNA about travel to Cuba and a copy of the latest government regulations on the topic are now available for \$2.00 from: John Dale, 2251 Pimmit Drive #730, Falls Church, VA 22043.

RECENZE

Bouhuys, Mies: *Anne Frank ne estas de hieraŭ*. El la nederlanda Esperantigis Nora Bartels. Bert Bakker, 1982 (Esperanta eldono 1988). 194 p., mapo.

Anne Frank, dektrijara juda knabino, kun sia familio kaŝfuĝis de la Nazioj de 1942 ĝis 1944, kiam ili estis perfiditaj. La Nazioj arestis ilin, kaj Anne mortis en koncentrejo. Post la milito, la taglibro de Anne Frank estis tradukita kaj publikigita en pli ol kvindek lingvoj (la Esperanta traduko estas jam delonge elĉerpita).

Anne Frank ne estas de hieraŭ rakontas en fikcia formo la historion de Anne Frank. La libro celas infanojn samaĝajn kiel Anne. Mies Bouhuys volis montri al hodiaŭaj infanoj, ke tio, kio okazis al Anne Frank, kaj tio, kion ŝi pensis kaj demandis kaj skribis en sia taglibro, ne estas nur historio, sed rilatas al la nuna mondo. Ankoraŭ ekzistas homoj, kiuj malestimas aliajn de malsama religio, raso, haŭtkoloro, vivmaniero; kiuj subpremas kaj ekspluatas aliajn homojn; kiuj volas trudi sian volon al aliaj homoj perforte.

Ĉi tiu libro komplementas la taglibron, metante ĝin en la kuntekston de historio kaj de la vivo de Anne Frank. Ĝi bone portretas la karakteron de Anne, kaj ŝiajn maturiĝantajn komprenon kaj vidpunkton. Ĝi montras kiel la judoj estis persekutataj, unue etskale kaj poste per ĉiam pli grandaj, rapidaj, kaj teruraj paŝoj. Ĝi nur resume skizas la du jarojn en la postdomo, kie la familio Frank kaj kvar aliaj personoj kaŝiĝis; pri tio Anne skribis detale en sia taglibro.

Frua ĉapitro, "La Du Paŭlinoj" (temas pri imagaj estaĵoj simbolantaj bonon kaj malbonon), kiu supozeble spegulas la pensmanieron de Anne kiam ŝi aĝis kvar jarojn, alakcelas la rakonton kaj estas tro infaneca por la celita legantaro.

La verkanto kaj la tradukanto elektis simplajn vortojn kaj uzis mallongajn frazojn konvenajn al junaj legantoj. Kvankam la libro estas por infanoj, ankaŭ plenkreskuloj legos ĝin kun intereso. La libro ankaŭ taŭgas kiel postkomenckursa legaĵo.

Maya Kennedy

Mullarney, Maire: *Esperanto for Hope*. Dublin: Poolbeg Press, 1988. 184 p. Broŝurita. Ĉe ELNA: Kodo: ESP021, Prezo: \$14/membroj, \$14.75/nemembroj.

A relative newcomer to Esperanto has produced an engagingly readable book. It provides a lively look (in English) at the modern Esperanto movement.

"If that English is good enough, my French will do," introduces Chapter 1. A list of provocative chapter headings tempts one to read on. Chapter 2 deals with language discrimination with quotes "straight from China."

Chapter 3 tells how a brave boy creates a language and it introduces "two pillars of the language." Here she reports the important news reaching UEA in 1979 from Iran. After the fall of the Shah, the new Minister of Education issued new textbooks in social science for post-primary schools. Two of these gave generous space to information about Esperanto to one and a half million students. Students began to boycott "imperial" languages and 80,000 actually demanded that they be taught the International Language instead. Training courses were set up and attracted 675 teachers.

In Chapter 4 she tells how "Esperanto came to life for me among 149 friends and teachers from 30 countries." She meets Kevin Laughery, an American studying at the North American College in Rome. While there, he helped with the Vatican Radio Esperanto broadcasts.

"A translator/psychologist who writes detective stories explains why not everyone falls in love with Esperanto and how much money the World Health Organization wastes" on language problems—the theme of the 5th chapter. This writer, Claude Piron of Switzerland, quotes from Foreign Language Annals, a U.S. review for language instructors, to show how little many "specialists" actually know about Esperanto and its purposes. Mullarney goes on to say:

It should be clear that one of the principal purposes of Esperanto is to protect the less widespread languages and cultures, not to supplant them; how otherwise account for such enthusiasm among Finns and

Hungarians. ... far from being mechanical, Esperanto has grown organically from the seed sown by the [First Book].

Chapter 6 describes how curiosity drove the author to study linguistics. Reading on, one encounters in Chapter 7 "The amusements of travel; a disaster in Esperanto is more fun than a banquet without it." Here she deals with the important contribution the computer is making to the promotion of Esperanto; likewise the role of science-fiction writers and, in particular, her friend, honorary ELNA member Harry Harrison.

Chapter 8 deals with the World Esperanto Convention in Beijing, 1986—the largest gathering of foreigners ever to meet there, plus something about dragons.

Ms. Mullarney intersperses her narrative with short introductory lessons in Esperanto. As I read, I tried to view this experiment from the standpoint of a novice. I think it would be better to refer the reader to one of several good Esperanto textbooks. Aside from this, I recommend this delightful woman's book. Maire Mullarney points the way for any individual to master a language which can be spoken with accuracy, confidence and creativity the world over.

Cathy Schulze

Literatura Kamero

[Sendu viajn literaturajojn al la Redaktoro ĉe la redaktora adreso: P.O. Box 551, Pinole, CA 94564.]

TERCINOJ

En kiu cirklo de l' Purgatorio
Eltrovis fine Dante Alleghieri
La kabeintojn? Aŭ ĉu Vergilio

Ĝin pasis aŭ ŝajnis malaperi,
Por ŝirmi la poeton de l' angoro
De vidi la perditajn trosuferi,

Tiel proksime al la Verda Koro,
Sed malproksime de la Vero Verda?
"Ho Kabe! Kabe!" krias la sufloro.

Ĉu tiu homamaso celoperda
Al Dante pledis resti sur la vojo
Kaj doni eĉ nur onon de kuler' da

Esperanto? Ĉu al li ilia bojo
Ne kompreneblis? Ĉu li nur la muron
Rigardis, sen por eĉ nur unu fojo

Vidi Kabeojn kaj Babelan Turon
Kaj aŭdi la babilon kaj torturon?

de William F. Orr



VOLAS KORESPONDI

Amikeco transllmoj

Nota: Nomojn kaj adresojn ni prezentas dikliteraj; familiaj kaj urbaj nomoj estas MAJUSKLAJ. Komojn ni uzas por montri ŝanĝon inter linioj en adreso.

ĈEĜOSLOVAKIO

- Jiri OPOCENSKY, Horská 439, 54302 VRCHLABI 4. 25-jara studento de arĥitekturo, interesiĝas pri vojaĝoj, turismo, sporto, muziko, modo, arto, arĥitekturo, fotografado, lingvoj; kolektas pm, bk, monerojn.
- Marta DRAHORADOVA, Frani Sramka 848/17, KLADNO 4, 272 04. 26-jara edzino kun du infanoj, interesiĝas pri ĉio bela, naturo, bestoj, ĉevaloj kaj vojaĝado, ŝatas homojn kiuj scias ridi.
- Sonja ZEDNIKOVA, Trojanova 10, 120 00 PRAHA 2. 60-jara pensiulino, volas interŝanĝi bildkartajn salutojn kun usona amiko.

FRANCIO

- Nicolas MONTAGNA, 35 rue Boulainvilliers, F-75016 PARIS. 19-jara viro, kun gejunuloj.

GERMANIO FR

- Marcus SIKOSEK, Kampstrasse 75A, D-4390 GLADBECK. 16-jara ateisto, serĉas iun, kiun ankaŭ interesas politiko, historio, klasikeca muziko, komunikiloj, lingv(istik)o(j); prefere persono pli ol 15-jara.

HUNGARIO

- Erno NAGY, H-6781 DOMASZEK, Liliom u. 12/B.. 45-jara agrara inĝeniero, kun similaĝa samideano pri flauŝo, folkloro, muziko, naturo, kaj la popolmoroj.
- Esperanta Grupo "Amikeco", Kossuth Gimnazio, Dayka G. ut 4. sz., H-3529 MISKOLC.. 14-15-jaraj gegimnazianoj, interesiĝas pri ĉiuj temoj.

KANADO

- T. James BRENNAN, 25 Kathrose Drive, WILLOWDALE, Ontario M2J 3P4. 56-jara, interesoj estas lingvoj, literaturo, religioj kaj vegetarismo; korespondos Esperante, france, germane kaj angle.

POLLANDO

- Mirosława JANAS, Zychlin 13/3, 63-324 KUCZKOW, woj. Kalisz. 13-jara lernantino en la sepa klaso, interesiĝas pri fiŝoj.
- KLEBOWSKA Malgorzata, Zychlin 1, 63-324 KUCZKOW, woj. Kalisz. 13-jara lernantino, interesiĝas pri Esperanto, historio, biologio kaj bestio, tre ŝatas legi librojn.

- JEWUTA Krzysztof, ul. Wieniewskiego 87/3, TYCHY 43-100, woj. Katowickie. 13-jara, interesiĝas pri sporto, aŭtoj.

Plotr SIBIGA, ul. Zubrzyckiego 44/4, os "Z", 43-135 TYCHY. 13-jara, interesiĝas pri ŝipoj el la IIa mondmilito.

Yolanta HARASIM, ul. Pruszcza Solska 25a, 23-400 BILGARAJ, woj. Zumosc. 16-jara lernantino, interesiĝas pri turismo, muziko, ŝatas legi librojn.

Ewa KUCIK, Zarzyce Wik. 95, 34-742 LENCZE, woj. Bielsko-Biala. 17-jara, interesiĝas pri turismo, muziko; kolektas bk.

Tomasz WATOR, Wojska Polskiego 25, 63-910 MIEJSKA GORKA. 18-jara esperantisto, interesiĝas precipe pri biologio kaj ekologio, ankaŭ pri sporto, muziko kaj turismo, kolektas pm kaj bk.

Grzegorz RICHERY, ul. Kotobreska 23a/2, 80-390 GDANSK-OLIWA. 18-jara, interesiĝas pri muziko, kulturo, literaturo, Esperanto.

Justyna BATOR, ul. P. Skargi 13/26, PL-39-300 MIELEC. 19-jara fraŭlino, interesiĝas pri populara muziko, turismo, kolektas bk de urboj.

GAJDA Mirosław, ul. Bobrowska 9, 08-530 DEBLIN. 20-jara lernanto en teknikumo, interesiĝas pri turismo, disko, sporto.

Justyna MADEJSZA, ul. Spasowskiego 13 "b"/6, 75-350 KOSZALIN. 20-jara studentino pri ĵurnalismo, interesiĝas pri turismo, sporto, filmo, korespondos pri ĉiuj temoj.

Beata KOLINSKA, ul. Nidzicka 4, 80-110 GDANSK. 20-jara studentino, interesiĝas pri turismo kaj literaturo (vidu foton).

Iwona KACZOR, ul. Zahadzkiego 22/129, 43-100 TYCHY. 20-jara studentino, parolas esperante, france, ruse, interesiĝas pri historio, muziko, sporto, ŝatas librojn, filmojn, aventuron, vojaĝon, kolektas bk, pm.

KOSIOR Zdzisława, 44-335 JASTRZEBIE III, ul. Wielkopolska 53/34. 23-jara studentino, interesiĝas pri turismo, literaturo, folkloro, kolektas bk, faras fotojn kaj dizpozitivojn.

Rafal ZURAWIK, Rzymisko B.G., 62-733 STRACHOCICE, woj. Konin. 23-jara, hobiaj estas bildkartoj kaj turismo.

Adam KIOLBASA, 44-304 WODZISLAW SL., os. 1 maja 3/II/2, woj. katowickie. 23-jara fraŭlo, interesiĝas pri turismo, kulturo, vojaĝoj kaj religioj, kolektas pm kaj bk.

Rafal STANEK, os. Wysokie 4/42, PL-31818 KRAKOW. 24-jara elektronika

inĝeniero, interesiĝas pri komputiloj (PC-serio), turismo, vojaĝoj, naturo, ekologio; tre interesiĝas pri Usono.

ROZICKA Elzbieta, ul. Pokoju 74/7, 43-143 TYCHY LEDZINY, woj. katowickie. 24-jara, interesiĝas pri turismo, kulturo, muziko, ekspozicioj, kanzonoj.

Malgorzata ARCISZEWSKA, PL-21-014 NADRYBIE, woj. Lubelskie. 24-jara instruistino, interesiĝas pri turismo, folkloro, sporto, kolektas bk, pupojn en popolaj kostumoj.

Jadwiga KILIANEK, Chotcza Dolna, 27-312 CHOTCZA, woj. Radom. 24-jara asistantino dentista, interesiĝas pri turismo, muziko..

PALUCH Katarzyna, 42-550 SOSNOWIEC, ul. Poplawskiego 20/33. 25-jara flegistino, interesiĝas pri turismo, libroj, literaturo.

Elzbieta SLIWOWSKA, ul. Spoldzielczo 24, 16-123 KUZIZICA BIALOSTOCKA, woj. Białystok. 25-jara, interesiĝas pri turismo.

Krzysztof DOBERSZTYN, 62-110 DAMASLAWEK, Grunwaldzka 15. 26-jara studento en Agrokultura Akaedemio, interesiĝas pri sporto, vojaĝoj, lingvoj, naturo, muziko, usona kulturo, kolektas bk, monojn.

Marian PAULISZYN, 65-061 ZIELONA GORA 8, P.O. Box 141. 26-jara, pri ĉiuj temoj, tre volus interkonatiĝi kun elkoraj amikoj; skribas ankaŭ germane kaj iom angle.

Malgorzata RADOLA, 63-803 BODZEWO 33, woj. Leszczyńskie. 26-jara bibliotekistino, interesiĝas pri naturo, vivo de aliaj popoloj.

Urszula SIENKOWSKA-CIOCH, ul. Gesła 2/15, 16-300 AUGUSTOW. 27-jara, interesiĝas pri literaturo, kino, fotografio, turismo, Esperanto, kolektas librojn pri bela literaturo.

Rusznik BOGDAN, ul. St. Wyszynskiego 13/10, 20-102 LUBLIN. 27-jara laboristo, interesiĝas pri pentroarto, muziko kaj jaĥtoj, kolektas albumojn pri famaj pentristoj.

Iwona BRONIEWSKA, ul. Stalingradzka 20 m. 112, 03-468 WARSZAWA. 28-jara bibliotekistino, interesiĝas pri geografio, arto, literaturo, filatelo, kolektas bk, prospektojn, librojn, pm.

Kazimiera PAJAK, Kurow 155 a, 34-233 HUCISKO. 29-jara fraŭlino, interesiĝas pri kulturo, turismo kaj literaturo, kolektas bk.

Slavomiro GEBĆIK, L. str. Sniadeckich 1/3, 26-600 RADOWO. 29-jara fraŭlo, kun

junulino.

Bozena kaj Stanislaw CISZEWSKY, Dolna Gnipa 5, 86-133 GORNA BNIPA, woj. Bydgoszcz. 29-34-jaraj geedzoj kun 4,5-jara filo, interesiĝas pri turismo, kulturo.

Anna WLODARCZYK, 99-300 KUTNO, ul. Sowinskiego 5/12. 30-jara inĝenierino, interesiĝas pri turismo, naturo, muziko, filmoj, legado de bonaj libroj, fremdaj lingvoj, kudrado kaj politiko.

Hanna KWASNIEWICZ, ul. Wieniawskiego 10/48, 43-110 TYCHY. 30-jara instruistino, interesiĝas pri turismo, kulturo, problemoj de edukado ktp.

Dariusz NICZMAN, PL 05-820 PIAS-TOW, ul. Studzienna 19. 31-jara konstruteknikisto, interesiĝas pri rokmuziko, fotoarto, antikva historio, admiras ekskursojn, arbarojn, legojn, ŝatas veli.

Elzbieta KEMBLowska, ul. Aleksandrowska 16 m 56, PL-91-120 LODZ. 31-jara informadikistino, interesiĝas pri literaturo, muziko, turismo, E-movado; kolektas librojn kaj sondiskojn.

Henryk KLIMCZUK, 22-620 KOMAROW, ul. Borowinka 36. 33-jara kuracisto-veterinaro, interesiĝas pri turismo, vojaĝoj, kolektas pm, bk.

Maria WASILEWSKA, Boznicza 5/42A, 33-300 NOWY SACZ. 34-jara inĝenierino, interesiĝas pri filmo, muziko, turismo, folkloro kaj Esperanto; ankaŭ la 9-jara filineto Eliza serĉas korespondamik(in)on.

Grazyna GAZA, 43-229 PSZCZYNA-CWIKLICE, str. Spokojna 5. 34-jara kosmetikistino, fraŭlino, ŝatas muzikon, filmojn, librojn, kolektas bk.

Elzbieta KLAPYTA, 57-513 WILKANOW 127, woj. Walbrzych. 36-jara, interesiĝas pri psikologio, sporto, fremdaj lingvoj, literaturo.

CHOROSZ Maria, OLECKO 19-400, ul. Batorego 18/9. 39-jara inĝenierino de zootekniko, interesiĝas pri problemoj de la ĉiutago, historio, Esperanto.

Wiesława TRYPKA, ul. Bojanowskiego 14/48, 35-208 RZESZOW. 40-jara gvidistino en muzio (ankaŭ okupiĝas pri eldonadoj de la institucio), pri ĉiuj temoj.

Adam GRACZYK, ul. 1000-lecia 31A/21, 13-300 NOWE MIASTO. 40-jara fervojisto, interesiĝas pri turismo, literaturo, historio, geografio, sporto kaj folkloro, kolektas pm kaj bk.

Bogumila LYCHOWICZ, 58-100 SWIDNICA, ul. T. Michejdy 11. 42-jara, interesiĝas pri turismo, modoj, kaj Esperanto.

Mieczysława OWCZAREK, 63-523 KUZNICA GRAB, Woz. 44-jara doktoro, interesiĝas pri turismo, medicino.

Jozef LAGOVSKI, ul. Mazowiecka 33, PL-15-601 BIALYSTOK 6. 48-jara geografo, interesiĝas pri turismo, kolektas bildkartojn, mapojn, bankbiletojn.

PIETRKOWSKI Zenon, Wymystow 109, KUNOW 27-415, Kielce. 48-jara teknikisto, interesiĝas pri turismo, kulturo,

historio.

Henryk GRADYS, 37-555 SOSNICA 119, woj. przemysle. 50-jara, interesiĝas pri turismo kaj kulturo, kolektas bk.

Lidia BOGUSZ, ul. Matopolska 46/16, 50-515 SZCZECIN. 52-jara, interesiĝas pri turismo, kulturo, muziko.

ROSZAK Karolina, Zychlin 13/4, 63-324 KUCZKOW, woj. Kallsz. Lernantino en la sesa klaso, interesiĝas pri plastiko, aŭtoĵ, kolektas ludilojn, pupojn, ursetojn, volus pli bone koni batalojn de Malproksima Oriento.

Anita KRYSZTOFIAK, Zychlin 6, 63-324 KUCZKIOW. Lernantino de la sesa klaso, interesiĝas pri poŝmarkoj, humoro, ŝatas legi librojn.

Piotr SMIGIEL, ul. Bronikowskiego 3 m 2, 85-426 BYDGOSZCZ. Volas korespondi kaj interŝanĝi pm.

RUMANIO

(Skrabante al Rumanio, ne plu necesas kaŝi la esperantistecan de la letero)

FARKAS Antal, str. Sovata 40 Bl. Q6. Ap. 10, RO-3700 ORADEA. Deziras korespondi kun esperantistoj el la tuta mondo, interŝanĝos bk, pm, kalendaretojn (eĉ el pasintaj jaroj).

SOVETIO

Nikolao LARIN, PK. 199, SU-354068 SOCI. 35-jara oficisto, fratilo, interesiĝas pri naturo, sporto, vojaĝoj, ŝatas muzikon, legi librojn kaj revuojn.


Angelija BUOZIUVIENE, Josvainiai, Skroblu 10-3, Kedainiu Raj, Litovio. 35-jara komercistino, edzino kun du infanoj, ŝatas librojn, muzikon, vojaĝojn.

Vitalij STELMAH, str. Chelabinskaja 2-63, SU-105568 MOSKVA. 37-jara matematikisto/fizikisto, interesiĝas pri politiko, filozofio kaj religio (aparte hindaj), parapsikologio, jogo, ŝatas librojn, muzikon, klasikan gitaron, interŝanĝos bk pri urboj.

BIRJUKOV Andrej, SU-620010 SVERDLOVSK, ul. Inĝenernaja 75-53. Li serĉas literamikojn por siaj geamikoj, eninter kiuj la plimulto havas pli ol 18 jarojn.

ZAIRIO

Mutombo TSHIKUNGA, c/o ONPTZ/LUKALA, Bas-Zaire. Poŝtisto, interesiĝas pri sporto, muziko, longaj promenadoj en la kamparo, multe legas.



Local Contacts

[* = Issues a regular or occasional bulletin or newsletter. + = Participates in information-requestor exchange program with ELNA.]

+Arizona: Wm. Shanks, E-o Soc. of AZ, 1345 W. Escarpa, Mesa, AZ 85201

+California: E-o Assn. of Los Angeles, 1112-7th St. #811, Santa Monica, CA 90403

*+California: E-o Klubo de San Diego, Box 288012, San Diego, CA 92128-0991, (619) 528-0880

California: Inland Empire E-o Group, 22797 Barton Rd. #117, Grand Terrace, CA 92324, (714) 689-5576 or (619) 949-1958

+California: Orange Co. E-o Assn., Box 1538, Garden Grove, CA 92642

*California: E-o Soc. of Ventura County, 5968 Joshua Trail, Camarillo, CA 93010

+California: Santa Barbara E-o Soc., 4710 Dexter Dr. #9, Santa Barbara, CA 93110

*+California: SFERO, 410 Darrell Rd., Hillsborough, CA 94010, (415) 342-1796

*+California: Berkeley E-o League, Box 324, Berkeley, CA 94701-0324, (415) 222-0187

*+California: E-o Group, 440 Bret Hart Rd., Sacramento, CA 95864

Colorado: Denver E-o Group, 995 Humbolt #205, Denver, CO 80218

+Colorado: E-o Assn., 4825 W. Moorhead Cir., Boulder, CO 80303

Colorado: Western Colorado Esperanto Center, c/o Martha Evans, 342 Hill Ave, Grand Junction, CO 81501, tel. (303) 242-0652

*+District of Columbia: Washington E-o Soc., 4406 - 35th St. NW, Washington, DC 20008, (202) 363-6197

Florida: Florida E-o Soc., 3988 Sabal Drive, Oviedo, FL 32765

+Idaho: David Baron, Box 37, Eagle, ID 83616

*+Illinois: Chicago E-o Soc., Box 64774, Chicago, IL 60664-0774

+Maryland: Baltimore E-o Club, T. Goodman, 3218 Shelburne Rd., Baltimore, MD 21208

*+Michigan: E-o Soc. of Michigan, PO Box 3011, Southfield, MI 48037, (313) 646-2965

+Michigan: Soc. of E-o Language Friends, c/o James F. Hillaker, 6191 Finch Lane, Flint, MI 48506, (313) 736-7652

+Michigan: E-o Club of Kalamazoo, 224 Rose Pl., Kalamazoo, MI 49001

Michigan: Cereal City Esperanto Friends, P.O. Box 41, Battle Creek, MI 49016-0041

+Minnesota: E-o Club of Minneapolis, 1528 Laurel Ave. #3, St. Paul, MN 55104

*+Missouri: E-o Asocio de Sankta-Luiso, P.O. Box 69144, St. Louis, MO 63169-0144

+Montana: Montana E-o Soc., 330 Lindley Pl., Bozeman, MT 59715

*+Nebraska: Nebraska Internacia-lingva Asocio, R.F.D. 1 Box 29, Wilber, NE 68465, (402) 821-2027

*+New York: NYC E-o Soc., c/o Thomas M. Eccardt, 455 E. 14th St., #3C, New York, NY 10009

New York: UN Office of UEA, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017

North Carolina: E-o Society of the Triangle, 5400 Belsay Drive, Raleigh, NC 27612

*+Ohio: E-o Assn. of Ohio, 1144 Kingsdale Terr., Columbus, OH 43220

*+Oregon: Portland E-o Soc., 11905 SW Settler Way, Beaverton, OR 97005

+Pennsylvania: E-o Society of Philadelphia, 26 E. Roumfort Rd., Philadelphia, PA 19119, (215) 248-0493

+Puerto Rico: E-o Society of Puerto Rico, Dr. Tomas Sarramia, Box 22916 U. of Puerto Rico, San Juan, PR 00931

Texas: E-o Study Group, P.O. Box 1446, Houston, TX 77251-1446, tel. (713) 522-7499, (713) 666-7509

+Texas: Rio Grande Valley E-istaro, Prenda Cook, Box 7167, Harlingen, TX 78550, (512) 423-3056

+Utah: E-o Club, Box 2166, Salt Lake City, UT 84110

+Washington: Seattle E-o Soc., 6002 NE 61st St., Seattle, WA 98115

Wisconsin: E-o Society of Wisconsin, 1958 N. 38th St., Milwaukee, WI 53208


*Regional (Rocky Mountain States): Intermountain E-o Group (AZ, CO, ID, MT, NM, UT, WY), p/a Charles Tustin, P.O. Box 112, Coram, MT 59913

*+Regional (Tidewater): E-o Society of the Carolinas and Virginia, P.O. Box 283, Durham, NC 27702-0283

*+Regional (New England): E-o Soc. of New England, P.O. Box 655, Concord, MA 01742, (508) 264-4349

Special Interest: E-o Language Toastmasters Club, P.O. Box 60860, Sacramento, CA 95860, (916) 485-3116

ESPERANTO



TRAVEL '90

The official ELNA convention, the (as yet) unofficial Tut-Amerika Kongreso, and an "oficiala antaŭ-kongreso de UEA", will all be occurring at the same time in Mexico City. Once before we held our ELNA convention outside the U.S., in Vancouver in 1980. But this convention will certainly prove to be our most international national convention!

Although in the past the Mexican Esperantists have been hesitant to invite a convention, they are now very excited about helping to host this very interesting gathering. Classes are being started, and more Esperanto meetings are being held than have been in a long time. We hope we will continue to be a good influence on our Esperanto neighbors to the south.

Mexico City, with over 17 million inhabitants, is a mixture of ultramodern; colonial dating from the time of Cortez; Aztec palaces and temples from the 14-15th centuries; and ancient ruins. Recently during the digging of the Metro, the ruins of an ancient civilization from 1500 B.C. were uncovered. No other city in the world so easily displays its fascinating past at the same time as its beautiful contemporary culture. Music and dance abound, and we won't even talk about reasonable prices for good hotels and shopping!

The week of July 7-14 will be filled not only with business sessions for ELNA, but also with marvelous excursions in and around the city: fascinating architecture and murals abound; the archeological museum is probably the best of its kind in the world; the floating gardens of Xochimilco will become



ELNA Convention Will Be Held in Mexico City
July 7-14, 1990
 (Samtempe kaj samloke, OFICIALA ANTAŬ-KONGRESO DE UEA)

Universala Kongreso de Esperanto, Havana, Cuba
July 14-21
 —or for those not going to Cuba—
"MEXICO, THE COLONIAL ROUTE"
 San Miguel de Allende—Guanajuato—Guadalajara—Morelia—Patzcuaro

OFICIALA PAOST-KONGRESO DE UEA
Taxco, Puebla, Oaxaca
July 21-28
TRI SEMAJNOJ VOJAĜANTE EN ESPERANTUJO!!!

Esperantujo one morning with special music and decorations; the world-famous Folklorico Ballet will be included; a visit to the famous shrine of Guadalupe, the University and the Pyramids of the Moon and the Sun; our banquet with Mariachi music. Other full-day trips are also available.

For those who are not going to Cuba, it would be a shame not to use this trip to see more of Mexico. The Colonial route north and west of Mexico City has some of the most charming and beautiful cities in the world! The week of July 14-21 will be one to relish for years, and yes, of course, we will have full Esperanto translation!

After the UK in Cuba, Esperanto Travel Service's "Oficiala Post-Kongreso" will visit Taxco, Puebla, and Oaxaca—cities which bring to mind the mental picture of how you think romantic Mexico has got to look.

Detailed information on these tours will be available from Esperanto Travel Service. If you do not regularly receive Esperanto tour information from them, please write or call to have your name added to their list.

ESPERANTO TRAVEL SERVICE
578 GRAND AVENUE
OAKLAND, CA 94610
(415) 836-1710

USE YOUR ESPERANTO TRAVEL SERVICE FOR ALL YOUR ESPERANTO TRAVELS

ELNA

President: Ken Thomson (1990)
Vice President: Dr. Duncan Charters (1990)
Secretary: Virginia Stewart (1992)
Treasurer: John B. Massey (1991)
Other Board Members: Prof. James Fonseca (1990), William R. Harmon (1990), David Wolff (1990), Ellen Eddy (1991), Nels M. Nelson (1991), William H. Schulze (1991), Prenda Cook (1992), Frank Helmuth (1992), Dr. Jonathan Pool (1992)
Commissioners: William R. Harmon (CO), D. Holland-Kaupf (Correspondence Courses), J. Gildermeister (Legislative Affairs), R. Kent Jones (Science & Technology), Jim Deer (Tape Service), Lucy Harmon (Travel Affairs), J. B. Massey (Wills and Gifting), Ellie Stein (Women's Affairs), Dr. James Cook (Youth Affairs), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato), John Mathews (Service Clubs)
Director, ELNA CO: Mark Stephens
ELNA Archivist: Hal Dreyer

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

ELNA Dues for 1990

Friend of Esperanto	\$7.50
Regular	\$25.00
Family	\$37.50
Youth (under 26)	\$12.50
65 year or above	\$15.00
Sustaining	\$50.00
Life	\$500.00

Dues are for the calendar year and are tax-deductible.

UEA dues 1990

Member-Guidebook only (MG)	\$ 7.00
Member-Yearbook only (MJ)	\$16.00
Member-Subscriber (MA)	\$39.00
Socio to Zamenhof (additional)	\$78.00
Subscription only to Esperanto	\$23.00
Subscription only to Kontakto	\$12.00
Life Membership in UEA	\$975.00

Send payments for UEA memberships or subscriptions to ELNA/UEA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND! If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to send a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (415) 653-0998. Thanks!

DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1990(1) of the ELNA Newsletter/Esperanto U.S.A. is February 25, 1990!
DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1990(2) of the ELNA Newsletter/Esperanto U.S.A. is March 25, 1990!

ELNA/UEA membership renewal kits and periodical subscription forms will be mailed to all current members via bulk rate mail at the beginning of November.

ELNA Newsletter
Volume 25, No. 7
ISSN 0030-5065
Esperanto League for North America, Inc.
P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530
Telephone: (415) 653-0998
Editor: Don Harlow
Typesetting & Graphic Design:
Gregory V. Wasson